


# ←miaj najbaroj→



Petro, kiu ridas... | Petro, kiu ploras...

**kia(j) estas**

lia domo?
liaj vestaĵoj?
lia aŭto?
lia ĝardeno?
lia bankokonto?
lia laboro?
lia edzino?
liaj familianoj?
liaj ferioj?
lia karaktero?
lia lito?
lia hundo?
lia ĉefo?
lia enirpordo?
lia bopatrino?
lia kuirejo?
lia kuirarto ?
liaj infanoj?
……………

ofte – ĉiam – neniam – fojfoje – regule – kelkfoje – ĉiutage – unufoje jare – sendube – verŝajne – certe – sufiĉe…

pura/malpura ~ nova/malnova ~ fermata/malfermata ~ hela/malhela ~ unua/lasta ~ bona/malbona ~ seka/malseka ~ larĝa/mallarĝa ~ multekosta/malmultekosta (bonpreza) rekta/malrekta ~ mola/malmola~ plena/malplena~ gaja//malgaja~ forta/malforta~ varma/malvarma~ ekzotika/ĉiutaga~ justa/maljusta~ facila/malfacila~ ĝentila/malĝentila~ afabla/malafabla~ granda/malgranda~ interesa/neinteresa~ stranga/normala~ bela/malbela~ dika/maldika~ longa/mallonga~ vera/malvera~ dolĉa/amara~ lerta/mallerta~ inteligenta/stulta~...

## Konsiloj por la ekzerco

Por enkonduki la ekzercon mi unue parolas pri « miaj najbaroj »: ili nomiĝas same Petro, sed iliaj karakteroj kaj vivoj tre malsimilas. Unu ĉiam estas bonŝanca kaj bonhumora, la alia tute male ĉiam malbonŝanca kaj kompreneble malbonhumora.

La partoprenantoj laboras pare, kaj laŭvice pridemandas la alian pri ekzemple:

*'La bopatrino de Petro kiu ploras, kia ŝi estas?'*.

La alia respondas:

*'Ho, ŝi estas malafabla, dika, forta, ....".*

Estas diversaj gradoj de 'malfacileco', do uzeblas la aktivaĵo por diversaj niveloj, kaj eblas fari diversajn 'rondojn' de la sama ludo:

- unu kun nur la priskribitaj ecoj (aŭ novaj laŭ la sama skemo);
- oni povas (mal)plifortigi la ecojn per 'et', 'eg', 'aĉ';
- oni povas plilongigi la frazojn per adverboj (verŝajne, certe, ĉiam, ktp);
- oni povas tute libere kaj troige paroli...